

**Redakta Komitato:** D-ro A. Albault, M. Ĝivoje, Prof. J. Görlich,  
D-ro P. Neergaard, Prof. B. Popović, Prof. S. Reiersöl, C. Stöp-Bowitz.  
**Ĉefa kaj respondeca redaktoro** Prof. B. Popović, Teknika fakultato,  
NIŠ, Jugoslavio

**Lingva kontrolanto** Prof. M. Šaponjić, Svetosavska 23/I,  
BEOGRAD, Jugoslavio

**Eldono de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA**  
Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 7,5 Ned. gld. = 2,2  
dol. = 25 N. Din

Por membroj de I. S. A. E. la jarabono 25 steloj (la jarkozito 10 steloj)  
La abonojn kolektas la landaj delegitoj de ISAE  
(La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)

Izdaje naučna sekcija Saveza esperantista Jugoslavije, Dobrinjska 12,  
Beograd (=jugoslovenska podružnica Međunarodnog naučnog društva  
esperantista). Za izdavača: odgovorni urednik Prof. Dr. Bož. Popović,  
(Tehnički fakultet, Niš)

Ŝtampano u Grafičkom preduzeću »ŠTAMPA«, Sarajevo; za štampariju  
Simo Bunčić.

# SCIENCA REVUO

UDK 001 (05) = 408.92

Vol. 18

N-ro 3 (71)

10. 9. 1967.

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 2,2 us. dol. = 2500 din

## Enhavo:

**A. Albault:** La fundamenta serpento

**J. Chvosta:** Komenco de historio

**A. Kapusi, T. Rosinsky:** Maljuniĝo de la nerva sistemo

**A. Pravda:** Pri vibroizolitaj fundamentoj por maŝinoj...

**ISAE TC 125:** El la fakoj

## PARDONPETO DE LA REDAKTORO

Pro kulpo de la ĉefredaktoro la pasinta numero de la Scienca  
Revuo estis notita kiel n-ro 2 de Vol. 19. Evidente devis esti.

Vol. 18, n-ro 2 (70)

kaj pluraj abonantoj jam atentigis pri la eraro. Por ke poste ne  
okazu ia miskompreno, ni petas la abonantojn korekti tion en sia  
ekzemplero (sur la kovrilpaĝo kaj sur la unua paĝo). Kompreneble la  
eraro ripetigas ĉe ĉiu nova artikolo de la tuta numero kaj tial ni petas  
precipe la aŭtorojn korekti siajn ekzemplerojn de la ricevitaj eltran-  
ĉaĝoj antaŭ la dissendo al la amikoj (kontraŭe la eraro estus ne plu  
korektebla).

406 : 408.92 »vipero«

## LA FUNDAMENTA SERPENTO

(A. Albault, Toulouse, Francio)

*La monstro, anstataŭ la tro malbonfama vipero, kreis el  
vi, Puro!, la fundamentan vipuro, kiu de tiu momento,  
eternigita de la unuanima konsento de ĉiuj esperantistoj,  
trarampas nian tutan literaturon, trompante la naivajn  
korojn, fierante je sia masko kaj senpune glorante sian  
malbenitan patron!*

(Waringhien: »La Demonio de la Preseraroj« en:  
»Eseoj«)

Jen malnova afero, pri kiu sufiĉe ofte fluis la inko. Mi jam aludis ĝin en miaj notoj al la 9-a eldono de la Fundamento (p. 14 kaj 343) kaj mi nun provos ĝin analizi.

\*\*\*

Estas nedubeble, ke la Fundamenta formo — t. e. la formo trovebla en la »Fundamento de Esperanto«, 1905, kaj en ĉiuj postaj eldonoj — estas *vipuro*. Same nedubeble, ke la sama *vipuro* troviĝas en la dua eldono de la »Universala Vortaro« kompostita en 1898 ĉe Weidenfeld kaj Kelter, Varsovio, kaj sensanĝe represita tri fojojn (sub nomoj de 3-a, 4-a kaj 5-a eldonoj) en 1900, 1901 kaj 1904 ĉe la sama presejo Kelter.

Sed oni sciu, ke la unua eldono de tiu verko aperis en iom pli granda formato ĉe Gins, Varsovio, en 1894, kun kompreneble tute alia tipografio. En tiu unua eldono la vorto ja estas *vipero*: la modifo de tiu origina formo efektiviĝis do okaze de la rekompostado ĉe Weidenfeld kaj Kelter en 1898.

Estas notinde, ke el la nacilingvaj adaptoj de la Fundamento, la unuaj — publikitaj en 1907 de Hachette — entenas ja ankaŭ la originan *vipero*: temas pri la hispana, greka kaj itala eldonoj: ili verŝajne estis pretigitaj laŭ la unua eldono de la »Universala Vortaro«. Tamen la slovaka eldono (1907), prizorgita de alia eldonejo kaj tradukita de la ruso N. P. EVSTIFEJEV kaj de la slovako A. ŜKARVAN jam entenas la Fundamentan *vipuro*. Ankaŭ tiun formon oni trovas en ĉiuj postaj naciaj eldonoj de Hachette, ekde la rumana en 1908.

\*\*\*

Ke la formo *vipero* estas la sola konscie dezirata de ZAMENHOF, montras la fakto, ke ĉiuj liaj vortaroj kaj verkoj, almenaŭ ĝis iu difinita dato, iam en 1907, entenas nur ĝin:

Jam antaŭ la apero de la »Universala Vortaro«, la »Plena Vortaro Rusa-Internacia« (p. 47) kaj la »Meza Vortaro Internacia-Germana« (p. 72) ambaŭ de 1889, kaj post ĝia apero la »Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch« de 1907 (laŭ 3-a eldono — fakte nura represo — 1910: p. 72 kaj 136); tiel same la »germanaj vortaroj« de JÜRGENSEN (ŝajne de 1904) redaktitaj de ZAMENHOF; ankaŭ tiel same la franca vortaro de BEAUFONT (1902) kontrolita de ZAMENHOF.

Ĉiuj entenas nur: *vipero*. Sed en 1909 la »Plena Esperanto-Rusa vortaro« entenas la Fundamentan formon (p. 149).

Sama stato en la Zamenhofaj tekstoj:

En la »Fundamenta Krestomatio« (1903) oni legas (p. 168):  
*Si kuris al la fenestro, por ĵeti la ringon sur la straton, sed ŝi sin detenis. La malgranda vipero tiel fortike enmordiĝis en ŝian koron, ke ŝi ne povis suferi, ke ĝi estu dispremata sub la piedoj de la preterirantoj.*

Sed la 5-a eldono tie entenas la formon *vipuro*, dum nova »Antaŭparolo« de ZAMENHOF, datita de Junio 1907, komenciĝas per jena frazo:

*Mi trarigardis denove la tutan Krestomation kaj mi forigis el ĝi ĉiujn preserarojn kiujn mi trovis.*

ZAMENHOF estus do profitinta tiun novan trarigardon por konformigi al la Fundamenta formo.

En tiu teksto temiĝas pri bilda esprimo, dum en »La Rabistoj« (1908 kaj represo de 1928, p. 29) temas pri insultoj:

*Ha! kiu volus doni al mi nun glavon en la manon, por haki brulan vundon al tiu vipero!*

Kaj sur p. 69:

*Vi ŝtelistoj, vi brulfaristoj, vi friponoj, venenaj viperidoj, kiuj ŝteliras en la mallumo kaj pikas en kaŝiteco,...*

Tamen ni notu, ke tiu traduko de la Schillera dramo jam aperis pli frue en »La Revuo«, nome ekde Aprilo 1907 (Vidu p. 399 kaj 494). Ĉi verŝajne estis skribita en 1906 aŭ pli frue, kaj ZAMENHOF ne sentis en 1908 la bezonon speciale interveni por korekti tiun detaleton.

Sed en liaj laboroj faritaj post 1907 li volas konformiĝi al la Fundamento. En 1909 libroforme aperis el la Biblio la »Sentencoj de Salomono«. Laŭ WÜSTER tiu traduko jam entenas la formon *vipuro*:  
 (23/32) *En la fino ĝi mordas kiel serpento kaj pikas kiel vipuro.* (Hachette, 1909, kaj Brita reviziita teksto). Ekde Aprilo aperas la »Genezo« en »La Revuo«, kie sur p. 152 ni legas:

(49/17) *Dan estos serpento ĉe la vojo, vipuro ĉe la irejo, mordanto de kalkano de ĉevalo, ke ĝia rajdanto falas malantaŭen.*

Tiu versego restas sensanĝa en la eldono de 1911 (p. 117), sed la Brita reviziita eldono modifiĝas al *cerasto*.

Por kompleteco<sup>1)</sup> ni notu, ke ankaŭ en aliaj lokoj de la Zamenhofa teksto aperas la formo Fundamenta: Ijob 20/16, Psalmoj 91/13, 140/4; Jes. 6/8, 30/6, 59/5. La saman formon oni trovas ankaŭ en la »Fabeloj« (IV, p. 169).

Kompreneble, ĝis la 1905 kaj eĉ 1907 praktike ĉiuj vortaroj konas nur la originan formon *vipero*, tiun de la unua eldono de »Universala Vortaro«, la influo de la postaj eldonoj ŝajnas nula.

<sup>1)</sup> Ni dankas al S-ro Pastro Downes, kiu bonvole komunikis al ni la enhavon de la Zamenhofa sliparo pri tiu punkto.

BOIRAC (1909) estas la unua vortaristo, kiu atentis la problemon, kaj ĉe la vorto *vipero* li aldonas noton: »*vipuro* en Universala Vortaro estas preseraro«. Pri kio li tute pravus, kiel ni vidis; cetere ĉiu tiutempa serioza leksikologo ne povis ne alveni al la sama konkludo: post kontrolo de la unua eldono de U. V.! Post tiu dato oni komencos trovi vortarojn, kiuj kontraŭe mencias nur la modifitan formon pro disciplino kaj oboe al la Fundamento; tamen ĝis la Unua Mondmilito KABE (1910) ŝajne estas la unua kaj sola tion fari. Dume en la sama periodo (akde 1907) ni povis nombri<sup>2)</sup> naŭ vortarojn kun *vipero* sola kaj tri vortarojn kun ambaŭ formoj. Unu el ĉi-lastaj, GROSJEAN-MAUPIN, citas ambaŭ en 1910 (*vipero* en la unua loko, *vipuro* en la dua), dum en 1913 li restigas nur la Fundamentan: oni scias, ke li estis akre riproĉita pro lia troa enlaso de neologismoj en la unua eldono!

Inter la du Mondmilitoj ne ekzistas sintena unueco: ni nombris<sup>2)</sup> ses vortarojn kun la origina formo, ses kun la Fundamenta kaj kvin aliaj kun ambaŭ.

Fine, post la Dua Mondmilito, ni estas devigitaj konstati, ke la plej multaj vortaroj (sep) citas ambaŭ formojn, dum tri citas nur unu el ili kaj tri aliaj citas nur la duan.

Ni aldonu, ke entute nur naŭ vortaroj el la 46 kontrolitaj<sup>2)</sup> donas la solan formon *vipuro*. Do ni povas konkludi jene: se konsideri la opinion de la plimulto, la vortaristoj neniam opiniis, ke *vipuro* devus esti la sola formo; ili male opiniis, ke ambaŭ estas konsiderendaj en egaleco, kiel »paralelaj« formoj. Aliparte ne ekzistas unueco pri la prezento de la demando: mi citos nur la atentindan opinion de V. SETĀLĀ, kiu mem uzas nur la originan formon; laŭ li la Esperanto-naciaj vortaroj devas noti ambaŭ formojn, sed la naci-Esperantaj nur la originan *vipero*. Kompreneble aliaj vortaristoj, kiel ekz-e M. C. BUTLER, esprimas la opinion, ke nur la Fundamenta formo meritas atenton.

Estas bone aldoni ĉi tie, ke la internacia formo ne povas ne influi: la latina *vipera* estas ankaŭ itala, rumana kaj eĉ hungara; ĝi respondas al F. *vipère*, A. *Viper*, G. *Viper* kaj al Okcitana *vipèro* aŭ *viparo*; kaj se la iberaj formoj deflankiĝis al *vibora*, tamen la iberaj adjektivoj (*viperino*) identas al la itala. Plie kaj precipe, la latina fariĝis zoologia genra nomo *Vipera*, kaj kiel tia estas uzata tra la tuta mondo.

<sup>2)</sup> Dank'al traserĉado de S-ro Setälä, kiun ni modeste kompletigis.

<sup>3)</sup> Letero de S-ro P. LOBUT, 23 JUN 65, kiu skribis al S-ino BUTIN en Marto 65.

Aliparte ni nun scias pri la ekzisto de eĉ tri skribaĵoj de ZAMENHOF pri la temo: letero al Pierre CORRET (10 MAR 08), poŝtkarto al Max BUTIN (8 OKT 10), kaj poŝtkarto al Corrado GRAZZINI (27 JUN 13).

Le letero al CORRET estas bone konata; ĝi aperis kompleta en la »Originala Verkaro« (p. 557) kaj estas trovebla en la »Lingvaj Respondoj« (6-a eld., p. 26 kaj 23). Mi resendas al tiuj verkoj. En tiu letero ZAMENHOF i. a. diras, ke »en la lastaj eldonoj de la Universala Vortaro troviĝis ne *vipero*, sed *vipuro*«, sekve li simple konservis tiun formon; poste li ne plu memoris, »ke la vorto (eble pro simpla preseraro) havis du formojn«.

Ŝajne la aŭtenta teksto de la poŝtkarto al Max BUTIN neniam estis publikita; ĝi ankaŭ ne povis esti retrovita ĉe lia vidvino<sup>3)</sup>. Sed ni jam sciis pri ĝia enhavo pro atestoj de S-ro Walter LIPPMANN (»E-o«, Junio 20, p. 116; »Dr. Zamenhofs Gutachten«, 1921, p. 61; »La Vendreda Klubo«, 1921, p. 50) kaj ankaŭ de WÜSTER (»Oficiala Radikaro«, 1923, p. 68). Fine prosperis al ni<sup>4)</sup> trovi en »Esperanto-Praktiko« (DEC 19) germanlingvan artikolon de Max BUTIN, en kiu troviĝas parto de la Zamenhofs teksto de la 8-a de Oktobro 1910; bedaŭrinde ankaŭ ĝi aperas germane. Estas tamen nedubeble, ke la Zamenhofs originalo estis Esperanta kaj ĝi verŝajne ne multe malsimilis de jena retraduko:

*Ĝi devas nomiĝi vipero, vipuro estas preseraro. Se mi devus atenti pri ĉiuj subtilaĵoj, mi ankoraŭ hodiaŭ estus ĉe modifado; tiam mi ankaŭ metus i. a. kuluro kaj ne kulero (komparu: kulero = ero de kulo!)*

Kompreneble multaj miros, ke la aŭtentan tekston neniu sentis la devon publikigi. Iuj diros, ke oni do devas teni tian tekston sub ĉiuj rezervoj. Aliaj asertas, ke BUTIN estis seriozulo. Cetere LIPPMANN memoras, ke li ricevis de BUTIN kopion de la Zamenhofs poŝtkarto; li ne vidis la originalon, sed »Max BUTIN estis tiel sincera, kaj oni eĉ povus diri: nobla karaktero, ke pri la ĝusteco de lia informo ne povas esti dubo«. Nu, persone mi neniel dubas pri la aŭtenteco de la teksto, sed mi sentas la devigon aldoni, ke bedaŭrinde sincereco ne ĉiam sufiĉas.

Trie, la teksto de la poŝtkarto al Corrado GRAZZINI aperis antaŭ nelonge en la itala »L'Esperanto« (MAR-APR 65) kaj en

<sup>4)</sup> Notoj de nia bedaŭrata amiko Paul CILIGA en »Franca E-isto« (n<sup>o</sup> 183), kie Redaktoro li estis, metis nin sur la spuron de tiu artikolo: D-ro SADLER, bibliotekisto de UEA kaj S-ro Reinhard HAUPENTHAL bonvole komunikis al ni la enhavon de la artikolo.

»Heroldo« (16 MAR 65); S-ro GRAZZINI afable sendis al mi fotokopion de tiu karto, kiu tekstas:

*Kara Sinjoro, — La formoj »kratago« kaj »vipuro« ne estas preseraroj. Por detale klarigi al Vi la kaŭzon, pro kiu mi ŝanĝis la originalan formon, mi nun bedaŭrinde ne havas sufiĉe da tempo. Se Vi estos en Berno, ni parolos pri tio detale. — Via L. Zamenhof.*

La projektita renkontiĝo ne okazis.

\*\*\*

Unuavide tiuj tri Zamenhofaj skribaĵoj ne tro akordiĝas. Tamen eblas ilin interpreti jene:

La tria (27 JUN 13) povas klarigi per tio, ke verŝajne S-ro GRAZZINI — kiu nun tute ne plu memoras la cirkonstancojn — demandis okaze de nove aperinta teksto, en kiu la du formoj *kratago* kaj *vipuro* tenis lian atenton; ZAMENHOF respondis do, ke ne estas preseraroj: la vortoj ja estas konformaj al la Fundamentaj formoj; »originala formo« kompreneble aludas la sciencajn nomojn, respektive *Crataegus* kaj *Vipera*.

La dua respondo (8 OKT 10) konfirmas la unuan: ja temas pri preseraro en la »Universala Vortaro«. Laŭ la citita artikolo en »Esperanto-Praktiko«, Max BUTIN sendis al la gazeto »Juna Esperantisto« ŝercan divenaĵon pri vipero = ero de vipo. La redakcio rifuzis ĝin, »ĉar la vorto estas vipuro«. Tiam BUTIN, kiu verŝajne atentis nur la originalan formon, skribis al ZAMENHOF pri tio kaj aliaj punktoj; ekde junaĝo pasie interesata pri zoologio, li verŝajne ne nur citis la ŝercan divenaĵon, sed ankaŭ insistis pri la bezonoj de lia ŝatata scienco. ZAMENHOF do koncedis, ke la sciencaj necesoj finfine estos pli gravaj por tiaj okazoj ol la necesoj de la Fundamento. Cetere ni tuj vidos, ke la sinteno de ZAMENHOF rilate al la vortfinaĵoj similaj al Esperantaj sufiksoj ŝanĝiĝis tra la jaroj.

Kontraste, la unua letero, tiu al CORRET (10 MAR 08), estas multe pli detala ol la du aliaj respondoj. Oni scias, ke tiutempe CORRET zorge legadis la Zamenhofajn tekstojn aperantajn en »La Revuo« kaj ĉiumonate notis en »Lingvo Internacia«, la plej rimarkindajn esprimojn el ili. Tiel, en 1907, sur la paĝo 330 (pri la Julia n<sup>o</sup> de »La Revuo«, p. 494) li atentigas pri la ne-Fundamenta formo *legiono* (erare por *legid*), kiu aperas en la teksto de »La rabistoj« ĝuste dekon da linioj post nia *viperido*: sed tiun ĉi li pretervidis<sup>5)</sup>! Do, nur ĉe alia okazo li konscias pri la problemo — sed verŝajne li ne estis la unua en tio: unuaj povus esti la zorgintoj de la »slovaka Fundamento« (Vd.

<sup>5)</sup> Tiel same estas nenio pri *vipero* sur p. 224, kie temas pri la Maja »Revuo« (p. 399).

supre!); samtempe li demandas al ZAMENHOF pri *legiono*. ZAMENHOF zorge respondas, verŝajne supozante, ke tio aperos en »Lingvo Internacia«, same kiel la aliaj respondoj. Sed ĉio okazis, kvazaŭ CORRET, unu el la plej ardaĵoj tiutempaj »Fundamentistoj« mirus pri la respondo kaj ne estus konsenta kun ĝia enhavo! Efektive, li nenion aperigas. Male, en Januaro 1911 (p. 43) li notas la jam cititan versegon 49/17 el la »Genezo«, aperintan en la Decembra »Revuo« kaj li kursivigas ĝian Fundamentan formon, same kiel li kutimis fari por ĉiu nova vorto aŭ interesa esprimo!

La Zamenhofan leteron li aperigos nur en 1927, fotokopie, en la »Internacia Radio-Revuo« (N<sup>o</sup> 13—14), kies ĉefredaktoro li estas. Sed li ne aperigos ĝin sola! Apude estos legebla alia letero de ZAMENHOF, ankaŭ en fotokopio: ĝi fakte estas rekomendo por la originala formo, aŭ pli ĝuste por ĉiuj originalaj formoj. Por la redakcio originala kaj originala ja estas malsamaj! Tiu alia letero (11 APR 11) estis adresita al VERAX kaj aperis en »I. R. R.« sub la »kopirajto de Grenkamp-Kornfeld«, »nuna posedanto« de la letero! Kiel ajn tio aspektas stranga, kaj kiel ajn severe estos juĝita tia sinteno, tiu »posedo« ja povas klarigi, kial la letero restis kvazaŭ nekonata: ĝi aperis nek en la »Originala Verkaro« nek en la »Leteroj«. Pro ĝia graveco, jen ĝia plena teksto:

*Kara Sinjoro, — Vian opinion mi trovas tute prava, kaj por ĉiuj natursciencaj nomoj mi konsentas ĉiam preni la nomojn latinajn en Esperanta transskribo. Se en la Universala Vortaro troviĝas nomoj de bestoj kun formo ne latina la fakto venas de tio, ke en la unuaj jaroj mi ne havis ankoraŭ la principon pri la neceseco doni al tiuj nomoj formon latinan, sed nun mi ordinare gvidas min per tiu principo.*

*Tio sama estas ankaŭ kun la diversaj finiĝoj, kiujn mi en la unua tempo ŝanĝadis pro ilia simileco kun Esperantaj sufiksoj, sed kiujn mi nun ordinare ne ŝanĝas; sekve mi konsilas uzi -ilo, -ino, -ulo k. t. p.*

*Mi skribas al Vi kompreneble nur mian privatan, personan opinion, eble estus bone, se Vi prezentus la demandon al la voĉdonado de la Akademio. — Via L. Zamenhof.*

\*\*\*

Ni do konstatas, ke ZAMENHOF havis la konstantan zorgon pri la ebleco de dusencaĵoj; kaj tion Prof. WARINGHIEN jam aludis en »Lingvo kaj Vivo«. Sed aliparte iom post iom la »iniciatoro« de nia lingvo alvenis al la konkludo, ke en multaj kazoj tia dusenceco ne estas ĝena. En siaj lastaj verkoj li pli kaj pli respektas la originalajn

formojn, kiam li devas enkonduki novajn vortojn; kompanse li principe konservas la formojn, kiuj aperis en la Fundamento. En la okazo de *vipero/vipuro* li simple kaj plej verŝajne ne rimarkis, ke estiĝis du formoj: aliaj rimarkis kaj rimarkigis al li; tial li admonis, ke oni do preferu la Fundamentan: en tiu epoko furiozis la Ida skismo kaj nepre necesis plej severa disciplino. Krome li fidis, ke scienco — se bezone — scios uz<sub>i</sub> taŭgan formon — nun, aŭ pli poste; li eĉ antaŭvidis ke en la estonteco, ankoraŭ fora por ni, la lingvo socie disvastiĝinta plu evoluos ĝuste kiel ĉiuj aliaj lingvoj, sen konstanta referenco al liaj verkoj...

Kaj jen rimarkigo, kiu ŝajne donas plian argumenton al mia tezo: en alia okazo, tiu de *plateno/platino*, neniuj rimarkigis al li, ke ekzistas du formoj. Sekve, en la »Fundamenta Krestomatio« li uzis la originan (kaj originalan!) formon ĉe la traduko de la »Unua Libro« kaj konforme al ties aparta rekomendo! Plie, en la 5-a eldono de la »F. K.«, kie li korektis *vipero* al *vipuro*, li ja ne korektis *platino*, kiu do restis tia ĝis en la 17-a eldono (p. 233) malgraŭ la Fundamento!

Fine kaj super ĉio ni povas esti certaj, ke ZAMENHOF entute ne alligis gravecon propran al tiaj kaj similaj bagatelaj detaletoj: la Vivo ja helpas trovi la plej taŭgajn formojn; ĝi ŝlifos kaj poluros ĉiujn elementojn de la lingvo tra la jarcentoj...



Sed kiel ajn estis kaj estas, ŝajnas, ke nun neniuj povas plu ignori la originan formon *vipero* de la unua eldono de la Universala Vortaro, se nur pro la premo de la internacieco; cetere ni vidis, ke ĝi estas trovebla en la granda plimulto de niaj vortaroj; kaj fakte nenio malhelpas uzi ĝin kiel »paralelan formon«, kiel formon paralela al la Fundamenta.

*Postnoto.* Estu permesite ĉi tie danki precipe Prof. WARINGHIEN, kiu volonte diskutis kun ni dubajn historiajn punktojn en tiu demando; sed ankaŭ interalie S-rojn LIPPMANN, GRAZZINI kaj ĉiujn aliajn jam cititajn, kiuj ĉiam afable respondis al niaj enketoj.

165.9 (093.5)

913:22

## KOMENCO DE HISTORIO

(J. Chvosta, Pedebrady, Ĉeĥoslovakio)

En la meza epoko, kiam la tutan vivon kaj ĉiujn sciencojn influis la religio, estis komenco de la historio klara: laŭ la biblio tio estis kreado de la mondo, kiu okazis eble kvar mil jarojn antaŭ la komenco de la kristana epoko. Ties signo estas la antaŭkristnaska sezono en la kristana liturgio, kiu nomiĝas advento kaj kiu daŭras kvar semajnojn por signi tiamaniere kvar mil jarojn, kiuj forfluis ekde la kreado de la mondo kaj elpelo de la unuaj homoj el paradizo ĝis la naskiĝo de Kristo. Ankaŭ la jarindikoj ekde la kreado de la mondo montris la saman tempon. La juda jarindiko kalkulis la jarojn ekde la jaro 3761 antaŭ la naskiĝo de Kristo, laŭ la bizanca jarindiko la mondo estis kreita en la jaro 5509 kaj laŭ la kalkulo de Scaliger en 4713 antaŭ la naskiĝo de Kristo. Pri la historio de homaro ekde tiu komenco informis detale la biblio, kiu konis nacion »elektitan« kaj naciojn ceterajn, el kiuj iuj tie estis nomataj kaj pri iuj oni sciis nur el la biblio. Ĉiuj ceteraj nacioj krom la »elektita« hebrea nacio estis nacioj paganaj, kiuj perfidis la kredon je ununura dio kaj adoris plurajn diojn.

Kiam la sciencoj evoluis, forigis la hegemonian influon de la religio kaj komencis pli detale studi la faktojn uzinte eĉ la rezultojn de nekristanaj, paganaj sciencistoj kaj esploristoj, oni ekkonis, ke la komenco de historio ne estas tiel klara, kiel ĝi ŝajnis en la meza epoko. La esploroj en arkeologio kaj palentologio ŝovis la komencon